## Radioamatoro - ĉefministro

Post la atenco kontraŭ Indíra Gandhi estis en la urbo Dillio elektita nova ĉefministro, de la Hinda registaro, ĝenerala sekretario de la Hinda registara partio Radžív Gándhi, filo de la murdigita ĉefministrino.

Por ni estas interesa tio, ke Radživ Gándhi estas aktiva radioamatoro kaj posedas propran radioamatoran voksignon VU 2 RG. Lia edzino Sonja estas same aktiva radioamatorino kaj ni povas ŝin aŭskulti sub propra voksigno VU 2 SON.

Radžív Gándhi faris radioamatoran ekzamenon en la jaro 1974 kaj sian voksignon VU 2 RG li ricevis la 1-an de januaro 1975. De tiu tempo li estas tre aktiva, precipe sur la frekvencoj 21,28 kaj 145 megahercoj. Li finkonstruis propran transiveran aparaton por telegrafie kaj fonio kaj duelementan antenon, tipo Guad kaj kun tiu ĉi konstruaĵo li laboris ĝis la jaro 1980. Elektroniko kaj komputiko estis hobioj de R. Gándhi.

La aĉetado de profesie fabrikitaj aparatoj ne estas por la hindaj radioamatoroj tro facila afero ĉar importo de elektronikaj aparatoj dum la lastaj jaroj plimalgrandiĝas.

Hindio estas lando de oftaj ciklonoj kaj inundoj. R.Gándhi, VU 2 RG, estis unu el tiuj radioamatoroj, kiuj en la okcidenta parto de sia lando organizis radioamatoran reton por tiuj ĉi katastrofaj situacioj, rapide uzeblan, kiam eĉ profesiaj komunikaj servoj ofte ne funkcias.

Sonja Gándhi, VU 2 SON, estas aktiva radioamatorino de la jaro 1975 kaj uzas similajn frekvencojn kiel ŝia edzo.

Du infanoj, Raulo kaj Priyanka ankaŭ interesiĝas pri radioamatorismo kaj oni diras, ke baldaŭ eĉ ili estos aŭdeblaj sur frekvencoj de radioamatoroj.

Laŭ biografia materialo, kiun eldonis la hinda radioamatora organizaĵo ARSI (Amateur Radio Society of India), la familio Gándhi karakterizas radioamaterismon kiel sian vivstilon.

RC/85